

# FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA  
ESPERANTO  
MOVADO

*M.H.E.L.E.\* (Nia Estas La Estonteco)  
Flandra Esperantista Grupo  
Ejo \* Breughel \*  
Mr. Jacquainlaan, 37, Brussel (Belg.)*

Officieel Orgaan  
van den

Vlaamschen  
Esperantisten -  
Bond



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.  
JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.  
Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.  
Eksterlando: 6 belgoj.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag  
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

## EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque	Fr. 55,—	bind
La Viro el Francujo — Ivans	29,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	55,—	»
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,—	»
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,—	»
Ŝi — H. Rider Haggard	29,—	»
Petrolo, vol. 1 — U. Sinclair	29,—	»
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,—	»
Luno de Izrael	29,—	»
La Dormanto Vekiĝas	29,—	»
Pallieter — F. Timmermans	28,—	»
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,—	»
La Homaj rasoj de la Mondo	24,—	»
Kudlago, la malgranda eskimo	5,—	»
Literatura Mondo (Jarabono), 6 n-j.	54,—	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz	18,—	»
Konversacia Literatura (Cseh-metoda)	12,—	»
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,—	»
Nieuw Leerboek (geïllustreerd)	12,—	»
Examenoppgaven	10,—	»
Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten)	10,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,—	»
La Verbo en Esperanto	10,50	»
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50	»
Schidlof Zakwoordenboek	25,—	bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,—	bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,—	bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	broŝ.
Flandra Esperantisto. 1-a jarkolekto (sen la n° 1)	10,—	»

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 3.— fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Flandra kaj Espeianta flagetoj: 5.— fr.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1.— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3.— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

# Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:

A. Pittoors  
Ten Eeckhovelei, 125  
Deurne-Noord  
Antwerpen



Administranto:

Adolf De Keyzer  
P. van Humbeekstr., 3  
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj

Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj

Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

## 8a Flandra Kongreso de Esperanto de la 15a Ĝis la 17a de Majo

### Definitiva programo



SABATON LA 15-an DE MAJO :

- 14a Malfermo de la Akceptejo en la stacidomo, ĝis la 20a.
- 20 Malfermo de la Kongreso en « Flandra Domo ».
- Laborkunsido de F. L. E.
- Interkonatigvespero.

DIMANCON la 16-an DE MAJO :

- 9.30 Katolika diservo en la preĝejo de la Paters Minderbroeders Vlamingenstr. 147.

- 9a Protestanta diservo.
- 9a Promenadeto tra la urbo.
- 10.30 Fotografado sur la ŝtuparo de la juĝejo.
- 11 Akcepto de la kongresanoj en la Urbodomo, mallonga vizito.
- 12 Kunveno de F. L. E. en kinejo « Lovanium ».
- 13 Festeno. Restoracio « Monico ».
- 15.30 1) Vizito al Sta Petro preĝejo.
- 2) Vizito al la universitata Biblioteko.
- 16 Fakkunsido de la geinstruistoj en Flandra Domo.
- 20 Esperanta Balo kun tombolo ktp. Restoracio « Monico ».

LUNDON LA 17-an DE MAJO :

- 9.30 Kunveno antaŭ la Flandra Domo kaj sekvantara iro al la stacidomo kie atendas la tramoj.
- 10 Forveturado al Tervuren.
- 10.40 Alveno en Tervuren.
- 11 Vizito al la Muzeo kaj Parko.
- 12.30 Tagmanĝo.
- 14 Vizito al la Kermeso.
- 16.40 Forveturo al Leuven.
- 17.20 Alveno en Leuven.
- Komuna vespermanĝo kaj adiaŭa vespero.

# Esperanto in de Praktijk.

## FRANKRIJK :

Tot het eerecomité der conferentie « Het Esperanto en het moderne leven » welke ter gelegenheid der Parijzer tentoonstelling doorgaat, zijn tot op heden 16 Fransche ministers toegetreden. Men voorziet een duizendtal deelnemers. In drie middelbare scholen van Besançon werden als experiment facultatieve Esperanto-leergangen ingericht door de afdeeling « Esperanto in de scholen » van voornoemde conferentie.

Door de administratie der staatsspoorwegen werd een officieele Esperanto-cursus ingericht voor het personeel van het Parijzer spoorwegstation Saint-Lazare. In al de stations der Fransche hoofdstad werden borden aangebracht met aanduidingen in Esperanto.

## HONGARIE :

De internationale handelsfoor van Budapest gebruikt Esperanto voor haar briefwisseling met het buitenland. Op de handelsfoor, welke van 30 April tot 11 Mei e.k. gehouden wordt, zullen tolken ten dienste staan der bezoekers-Esperantisten. Door de propagandadienst van vernoemde instelling werden aanplakbiljetten en reclamezegels uitgegeven; zij zijn gratis verkrijgbaar bij : Internacia Foiro, Alkotmány str. 8, Budapest V.

## ITALIE :

Door de zorgen van het ministerie van pers en propaganda zal binnenkort een prachtige brochure « La kvar sezonoj » (De vier jaargetijden) verschijnen. Deze luxe-uitgaaf wordt gratis aan belangstellenden gezonden; te bevragen bij : Cronache Italiane del Turismo, Via Vitt. Veneto 56, Roma.

## JAPAN :

« La Fervojisto » (De Spoorbediende), orgaan der spoorbedienden-Esperantisten in Japan, publiceert een terminologie in het Japansch en in het Esperanto ten dienste zijner lezers.

## NEDERLAND :

Voor het personeel van P. T. T. wordt een reeks Esperanto-leergangen in het Arnhemsche Esperanto-tehuis ingericht. Extra-verlof wordt door het beheer der Nederlandsche P. T. T. aan de deelnemers toegekend.

In samenwerking met het beheer der Nederlandsche Staatsspoorwegen werd voor Juli a.s., door het internationaal Cseh-instituut te Den Haag een tiendaagsche rondreis door Nederland ingericht. Voor inlichtingen zich wenden tot : Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat, 172, Den Haag.

## SOVJET-RUSLAND :

De officieele briefomslagen, in al de postkantoren der Unie verkrijgbaar, dragen aanduidingen in de volgende talen : Russisch, Fransch en Esperanto.

## TSJECHO-SLOWAKIJE :

In de technische hoogeschool te Praag werd Esperanto op den leerrooster geplaatst.

De eerste cantate in Esperanto is door Emil Muller van Praag voor soli, orkest en koor gecomponeerd geworden, op verzen van Dr Zamenhof. Zij zal voor de eerste maal uitgevoerd worden op het internationaal Esperanto-congres, dat dit jaar te Warschau wordt gehouden.

## La verdlandanoj kongresas

Dum Pasko la nederlandaj Esperantistoj kongresis en Den Helder. « En Den Helder, kie ni travivis niajn miel-lunajn semajnojn, kie nia filo naskiĝis; en Den Helder, kiun mi dum pli ol 30 jaroj ne revidis ». Tiel mi sopiris !

La respondo de mia edzino estis tiel mallonga kiel afabla : « Nu, iru tien ». Do... Sed mi ne estis la sola Antverpenano kiu intencis « iri tien ». Ankaŭ nia amiko Jan van As, lia edzino, kaj amiko Nand Volders la redaktoro de la rubriko : « Por la serĉemuloj » faris planojn. Amiko van As estas la feliĉa posedanto de aŭtomobilo. Sur la kovrilo de ĝia rezerva rado li propramane pentris verdan stelon kaj surskribon « Leert ESPERANTO de internationale hulptaal ».

La antaŭpreparoj, enskribiĝo, enpakado de valizoj k.t.p. estis baldaŭ farataj, kaj sabaton matene antaŭ Pasko, ni kvarope forvojaĝis norde.

Nia vojaĝo bone prosperis, faciligita pro la belaj kaj perfektaj vojoj, ebenaj kiel bilarddrapoj. Per la unua fojo ni pasis la « Moerdijk », ne bezonante la transiran ŝipon, sed rapide veturante sur la belega nova pontego. De tempo al tempo preterpasis nin aŭtomobiloj, pli rapidaj ol la nia, kies ensidantoj tre scivoleme rigardis nin. Mi miris pri tio, sed van As klarigis la aferon jene : « Jes, ili legis la poresperantoreklamon malantaŭe, kaj nun ili volas rigardi kiel aspektas Esperantistaj vizaĝoj ».

Proksimume je la 15a horo ni alvenis antaŭ la akceptejo en Den Helder, kie la Esperantistoj jam el — kaj en — svarmis kiel en abelujo. La aŭtomobilo estis tuj ĉirkaŭata de interesuloj.

Jam unu semajnon antaŭe ni ricevis belan kongreslibron, kun ampleksa programo, tre alloga. Ĝi enhavas ĉion kion kongresano nepre devas scii : belajn fotojn, ĉiujn kantojn kantotajn dum la kongreso. Ankaŭ la hortabeloj de la vagonaroj, aŭtobusoj kaj ŝipoj ne mankas. Ĝi estas juvelo kaj neniam mi ricevis tian 48-paĝan libron por landa kongreso.

Post la malferma parolo de S-ro Baas, prezidanto de « La Estonto estas Nia », la urbestro akceptis nin en la bela urbdomo. La urbestro tre ĝojis ke la Esperantistaro trovis la vojon al la plej norda urbo de la provinco Nord-Holando kaj speciale por la fremdlandanoj li laŭtlegis Esperantan bonvensaluton.

Je la 20.30 h. komenciĝis la interamikiĝa vespero en granda salono. Ĉiuj eksterlandanoj laŭvice parolis salutvortojn. Mi estis la lasta kaj kaptis la okazon por atentigi la kongresemulojn pri la kongresoj kiuj dum Pentekosto okazos en Leuven kaj Antwerpen. La Helderanoj faris ĉion eblan por agrabligi al siaj gastoj la vesperon, sed ankaŭ la Frisaj Esperantistoj bone helpis, prezentante la teatraĵon : « Kokin-Historio » kaj inter la programnumeroj, la kongreso danciŝ... ĝis la 2-a matene.

La dimanĉo estas la ĉefa tago de la kongreso, kaj tute diferencas de la sama tago tie ĉi. Je la 10-a la jarkunveno de L. E. E. N. komenciĝis; la tagordo, kiun ĉiuj membroj jam konis el « Nederlanda Esperantisto », enhavis ne malpli ol 17 punktoj, krome paroladon

de S-ro Holleman pri la vivo de Zamenhof, kiu preskaŭ unu horon daŭris. Ĉiuj punktoj ekzakte estis priirataj kaj esplorataj, ĉiu membro de L. E. E. N. libere povis diri sian opinion. La jarkunveno daŭris de la 10-a ĝis la 17-a, nur interrompita 1 horon por la lunĉo. Iom amare mi pensis pri la dumkongresaj jarkunvenoj en Belgujo, kiuj daŭras plej longe 1 1/2 h. kaj por multaj ĉeestantoj eĉ tro longe. Kvankam ni, eksterlandanoj, tute ne bezonis ĉeesti, tamen mi kaj pluraj aliaj eksterlandanoj ĉeestis la plej grandan parton de la jarkunveno, pro intereso. Tuj post la fermo ni vizitis la Naturhistorian Muzeon, kie la direktoro, D-ro Rehder, esperantlingve laŭtlegis kaj montris bildojn el la birdovivo.

La komuna tagmanĝo, je la 18.30-a daŭris apenaŭ unu horon, ĝi estis tre simpla, sed bongusta. Neniu mendis vinon. Nun ni estis liberaj ĝis la 20-a, kiam okazis la « multkolora Festvespero ».

Ok landaj kongresoj en Belgujo mi ĉeestis, sed tian dimanĉvesperon mi ĝis nun ne travivis. Kiel ĝin priskribi? Fakte ĝi estis unu granda longedaŭra, sed neniam laciga revuo. La tuta klubo kunlaboris. « Nova Sento » ĝi nomiĝas kaj sur la scenejo la gemembroj sidas ekster la klubejo « La Verda Kato ».

La dialogantoj estas la prezidanto kaj la sekretario; S-roj Prak Tikulo kaj Teo Riulo. La celo de Prak estis: konvinki Teo'n, ke estas necesege ke Esperantisto partoprenus la grupan vivon kaj ne restu izolulo. Estis tre malfacile konvinki Teo Riulo'n pri tio; Prak Tikulo bezonis krom sian tutan membraron, ankaŭ jongliston, ventroparoliston kun lia pupo, «tap»-danciston, la Gojlandajn trubadurojn, violoniston, la Verdajn Najtingalojn kaj tutan aron da Helder'aj ĉarmulinoj kiuj dancis belegan dancon en banvestoj. Kompreneble Teo Riulo fine konvinkiĝis kaj aliĝis al la grupo. La salonego, la dekorado, la lumigado sur la scenejo, ĉio estis perfekta kaj grandan honoron meritas pro tio la tuta klubo kaj precipe la reĝisoro, S-ro Lucas. Kontente, tre kontente, ni serĉis nian hotelon.

London... Je la 8.30-a ni jam renkontiĝis sur la vaporŝipo kiu kondukis nin al la insulo Texel, fame konata pro ĝia ŝafbredado kaj ankaŭ pro ĝia Zamenhof-monumento. Alvenante en la haveneto de Oudeschild post 40 minuta veturo, ni jam rimarkis la pioniron de Texel, S-ron Duinker, kiu kore bonvenigis nin. Aŭtobuse ni atingis la ĉeflokon Den Burg, kie ni en komforta salono trinkis kafon, kaj aŭskultis mallongan paroladon de S-ro Duinker pri la Esperantista vivo sur Texel kaj la historio de Zamenhof-monumento. Li montris belan filmon, pri tiu historio, kiun ni povis sekvi de la ricevo de la unua monero, de la demeto de la unua ŝtono, ĝis la fino: la solena inaŭguro. Poste ni vizitis la monumenton mem, metis florgarbon kaj estis fotografataj.

Kaj nun komenciĝis la pli ol duhora promenado al la banejo Koog, situanta al la alia flanko de Texel. Nia vojo kondukis tra pinarbaro kaj de tempo al tempo ni povis imagi ke ni troviĝas ie en la « Kempen » aŭ meze en la arbaro de Schoten. Alveninte en la belega banhotelo ĉiuj ripozis post tiu laciga promeno kaj poste oni disdonis la lunĉpaketojn, kiuj mirinde rapide malpleniĝis. Malgraŭ la marta temperaturo la tuta junularo iris al la marbordo por parto-

---

PLI OL MIL

ilustritajn libropagojn  
egalas tutjara kolekto de  
nia sola literatura gazeto :

LITERATURA MONDO

Abono por jaro : 65 fr.

Specimeno : 2 fr.

La plej detalajn kaj objek-  
tivajn librokritikojn vi tro-  
vas en

LINGVO - LIBRO

kvaronjara aldono al Lit.  
Mondo.

Abonojn akceptas kaj spe-  
cimenojn sendas :



*Majo.  
Monat' de gaja  
Sur la branio burĝanoj,  
ĉe ni novaj eldonoj.  
Prospekto pretas.  
Ĉu vi ne pretas?*

**Flandra Esperanto-Instituto**

Magdalenast., 29, Kortrijk (p.k. 326851)

---

preni diversajn ludojn. S-ro van As, la sesdekjara junulo, eĉ pied-  
banis...

Per aŭtobusoj ni reveturis al Oudeschild kie la ŝipo atendis nin.  
Kore ni ĉiuj adiaŭis S-ron Duinker.

Ni baldaŭ atingis denove Den Helder kaj tie la 200 partoprenintoj  
gaje brue disiĝis, kore salutante unu la alian kaj dezirante « ĝis  
revido ».

Kio plej trafis min ? La granda diferenco, kiun mi konstatis inter  
la kongresoj en Belgujo kaj Nederlando estas : ke ekster la kunveno,  
do, dum promonado, sur la ŝipo, en la hotelo, oni nepre parolas Es-  
peranton. Mi ne troigas, se mi pretendas ke mi en Den Helder multe  
pli parolis Esperanton ol dum la 8 kongresoj kiujn mi ĉestis en Bel-  
gujo. Ĉiam, kiam mi laŭkutime komencis paroli nederlandlingve,  
mi devis aŭdi : « Sinjoro, vi pekas ». « Sinjoro, parolu Esperanton ».  
« Sinjoro, mi ne komprenas vin ». Mi esperas, ke dum Pentekosto,  
en Leuven kaj Antwerpen oni ankaŭ agos tiel.

Lasta vespermango en nia hotelo sekvis. Refoje ni salutis la ge-  
samideanojn kiuj troviĝis en nia hotelo, kaj je la 19.45a S-ro van As  
startis sian aŭtomobilon. Deĵoranta policano-samideano montris la  
vojon por eliri Den Helder kaj liberigis por ni la veturvojon. En la  
mallumo ni rapidis suden lumigante la vojojn per la fortaj lanternoj  
de la aŭtomobilo. En Haarlem ni perdis la vojon tra la urbo. Ni haltis  
momenton por demandi, kaj jen, jam aperas samideano sur biciklo,  
kiu montris la bonan vojon. Fraŭlino Saxl prave diris : Nederlando  
estas la Verda Lando.

A. LODEMA.

---

**ĈU VI JAM ALIĜAS ? URGAS!!**

## Bileto de la Prezidanto

Jen la bela vetero alvenis; la somera tempo staras antaŭ ni, la tempo de la vojaĝado, vagado, biciklado, k.t.p. Dum la pasinta vintro multaj ege laboris; ili nun povas ripozi, tamen ne forgesu Esperanton ! Dum viaj ekskursoj propagandu ĉie por nia lingvo. Tre praktika propagandilo estas la verda flageto je la biciklo; ĉiuj niaj biciklantaj anoj tuj mendu verdan flageton en la Flandra Instituto, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

Dum la somero, centoj da verdaj flagetoj devas travagi nian landon !

**REGIONAJ KUNVENOJ.** — Nia anaro kreskas, la nombro de niaj sekcioj regule kreskas, en ĉiu sekcio oni vigle laboras, la interna organizo de la ligo pliboniĝis. Nur en unu kampo preskaŭ nenio ŝanĝiĝis, nome, la intima vivo. Ĉiujare, dum la kongreso, multaj liganoj sin renkontas; krom tio, trifoje en la jaro, estraranoj kaj kelkaj delegitoj, sin renkontas dum la ligkunvenoj. Ĉu tio sufiĉas ? Certe ne !

La Flandra Ligo devas esti granda rondo de geamikoj, kaj tial mi deziras ke la rilatoj inter la diversaj sekcioj plioftiĝos.

Tial la regionaj kunvenoj !

Mi donas ekzemplon : La 11-an de Aprilo diversaj sekcioj ĉeestis kunvenon en Loveno; de la 10-a ĝis la 12-a, je glaso da biero, ni gaje kantis kaj babilis.

Posttagmeze : ekskurso.

Por la 2-a de Majo, Mehleno invitis ĉiujn sekciojn de la regiono. Kunveno de la 10-a ĝis la 12-a. Posttagmeze, bicikla ekskurso.

En Junio, alia sekcio, siavice invitos ĉiujn sekciojn de la regiono. Sama programo.

Kaj tiel ni daŭrigos ĝis denove Loveno invitos nin, k.t.p.

Ĉu tiuj regionaj kunvenoj estas utilaj ? JES.

1) ĉar je la interkonatiĝo de la anoj de diversaj sekcioj ili multe helpas;

2) ĉar tiu interkonatiĝo kaj tiu interamikiĝo estas morala subteno por resti fidela al la movado;

3) ĉar dum tiuj kunvenoj oni povas priparoli la eblecojn en la regiono, rilate la organizon de kursoj, propagando, k.t.p.

4) ĉar ĝi ebligas prepari la kampon en loko kie jam ne okazis kurso; ekz. ni intencas organizi kurson en iu loko; kelkaj semajnoj antaŭ tiu kurso oni grupe ekskursos al tiu loko;

5) k. t. p. — k. t. p.

Por ke tiuj regionaj kunvenoj havu propagandan valoron, ĉiu havu la verdan flageton, kaj ĉiu parolu nur Esperanton dum kunveno kaj ekskurso.

**KONGRESO.** — Ĉiu ligano ĉeestu la kongreson. Dum la kongreso oni sin amuzu. Sed, ne forgesu ke la kongreso ankaŭ, kaj precipe, havas organizon kaj propagandan valoron; tial, ĉeestu la necesajn kunvenojn kaj, dum la tuta daŭro de la kongreso, parolu nur esperanton.



Ekzistas en nia ligo malbona kutimo; multaj anoj atendas ĝis la lasta semajno por enskribi. Al tiuj mi volas diri ke ili multe plimalfaciligas la laboron de la kongreskomitato.

**KURSOJ.** — Dum la pasinto vintro ni organizis proksimume 40 ĉekursojn — detalojn vi aŭdos en la ĝenerala kunveno dum la kongreso.

En la venonta sezono mi volas almenaŭ duobligi la laboron. Jam de nun mi petas la helpon de ĉiuj kiujn mi bezonas. Kiu vidas la eblecon organizi kurson en loko kie jam ne estis, tuj sciigu tion al mi kun la necesaj indikoj.

Je la konvena momento mi dissendos la necesajn indikojn. Mi ne povas fini sen esprimi mian koran dankon al ĉiuj kiuj bonvoleme helpis min dum mia pasinta laboro; mi esperas renkonti ĉiujn dum la kongreso por ke mi povu konatiĝi kun ĉiuj.

La prezidanto.

## Federacio de ĝeinstruistoj esperantistaj

Rigardu la definitivan programon de nia kongreso. Dimanĉon, je la 16-a, en la Flandra Domo, okazos la kunveno de la ĝeinstruistoj esperantistaj.

La prezidanto de la ligo malfermos la kunvenon, skizante la kialojn kaj celojn de la federacio de ĝeinstruistoj.

Post la elekto de provizora komitato estos preparolata la praktika organizo kaj labormaniero de la federacio.

Ceestantoj kiuj deziras paroli dum la kunveno, antaŭe avertu la prezidanton, aldonante la enhavon de la parolado.

Estas la devo de ĉiuj ĝeinstruistoj, kiuj deziras ke la esperantomovado sukcesu en nia lando, ĉeesti tiun kunvenon.

---

---

WIE ZICH NU ABONNEERT OP

## **FLANDRA ESPERANTISTO**

**Ontvangt het blad gratis tot 1 Juli**

*(begin van het bondsjaar 1937-38)*

STORT HET BEDRAG (20.— FR.) OP REKENING :

No 232150 VAN FLANDRA LIGO ESPERANTISTA, BRUSSEL

---

---

## Promenante tra Leuven...

ANTAŬRIMARKO : *Car la V. T. B.* jarlibro de 1930 donas tre interesan promenadvojon de H. C. tra la urbo de nia oka, ni permesis al ni sekvi la saman direkton, sed semtempe ni rakontos ion pri la diversaj vidindaĵoj.

De la *Stacidomo* ni sekvu la BONDGENOOTENLAAN, kaj direktu nin al la GRANDA PLACO kie sin trovas la *Urbdomo*.

Tiu vera mirindaĵo estis konstruata en la periodo de 1448 ĝis 1459. La arĥitekto estis Mateo de Layens. Sajnas vera giganta relikvia kesto kies fasado estas kvazaŭ unu skulptaĵo, 236 bildoj kaj ses elegantaj turetoj ornamas ĝin. Ĝi estis tute renovigita en 1829, kaj en la jaroj 1900-1914. Interne estas kvazaŭ muzeo de pentraĵoj, skulptaĵoj kaj antikvaj diversstilaj mebloj. Rimarku speciale en la Gotika salonego de la unua etaĝo, la pentraĵon de A. Hennebicq (1888) : « Pieter Couteleel, la lovena « Jan Breydel » deŝirante la privilegiojn de l' nobeluloj en 1360.

Flanke de la urbdomo troviĝas la *Preĝejo de Sankta Petro*.

Ĝi estas la plej malnova preĝejo de la urbo, kaj estis fondita antaŭ la jaro 1000 per Lamberto kun la Barbo. Tamen en 1176 la unua preĝejo forbrulis. Tio okazis ankaŭ en 1373, post kio oni levigis la hodiaŭan konstruaĵon, ĉirkaŭ la jaro 1425.

La formo de la preĝejo estas latina kruco (92,50 × 26,95). Ĝi enhavas multajn riĉajn kapelojn, interesajn pentraĵojn, skulptaĵojn kaj arĝentajn bildetojn. La plej valoraj estas tiuj de Dirk Bouts kaj Roger Van der Weyden. (Speciale « La lasta vespermangado » de Bouts).

Denove ni eniras la BONDGENOOTENLAAN, kaj laŭ la unua strato dekstre ni alvenas sur la VOLKSPLAATS (Popolplaco).

Jen antaŭ ni la nova *Biblioteko de l'Universitato*. La planoj estas de la amerika arĥitekto Whitney Warren. Ĝi nur datumas de 1921 ĝis 1927, anstataŭante la, dum la milito detruitan malnovan bibliotekon. La malantaŭa parto havas 7 etaĝojn por enmeti 1.260.000 da libroj. Belega sonorilaro sin trovas en la turo; estas donaco de la amerikaj inĝenieroj pro memoro al siaj kolegoj, kiuj mortis sur la batalkampo (1914-1918).

Malantaŭ la biblioteko sin trovas la *Preĝejo de Sankta Jozefo*, kiu, laŭ gotika stilo estas konstruita en 1870. Diversaj interesaj pentraĵoj ornamas ĝin.

Dekstre ni trairas la GRAANMARKT kaj tiam alvenas en *Sta Donatoparko*, kie ni vidas du antikvajn remparturojn, kiuj donas ideon pri la primitivaj fortikaĵoj de la unuaj urbaj remparoj.

Ni forlasas la parkon laŭ la BERIOTSTRAAT, kiu nin kondukas al la « *Naamsche Poort* », inter du malnovaj kolegioj.

Maldekstre la *kolegio de la Premonstranoj*, fondita en 1571, kies nunaj konstruaĵoj datumas de 1733, kaj estas specimeno de la stilo Ludoviko XV Dekstre, la *Reĝa Kolegio* (Collegium Regium) fondita en 1579 de Filipo II. Hispana reĝo. La hodiaŭa konstruaĵo estas de 1776, kaj servas kiel Zoologia Muzeo de l'Universitato.

Nun, ni marŝu kelkajn paŝojn dekstren kaj ni rimarkas la belan fasadon de la *Sta Miĥaela preĝejo*. Ĝi estas unu el la plej belaj

specimenoj de la baroka arĥitekturo en la Nederlandoj. Antaŭe ĝi estis la preĝejo de la Jezuitoj, kaj oni konstruis ĝin laŭ planoj de pastro Hesius en la jaroj 1650 ĝis 1671.

Ni pluen iras en la direkto de la Naamsche Poort (Namura Pordego). Sur la plej alta parto de tiu strato ni vidas dekstre kaj maldekstre la malnovajn *Van Dael* — *kaj Van 't Sechtichkolegiojn*.

Iom pluen ni atingas la *Sta Kwintena Preĝejon*. (St. Kwintenskerk) konstruita en 1450. La turo dum la XIV J. C. En 1775 ĝi estis ornamenta laŭ la malbona gusto de tiu periodo kaj perdis sian unuan simplecan karakteron. Multaj pentraĵoj beligas la diversajn altarojn kaj angulojn. En la ĉirkaŭaĵo ni alvenas ĉe la NAAMSCHE POORT, Dekstre ni sekvas la aleon por tuj, je la dekstra flanko, eniri la SCHAPENSTRAAT kiu nin kondukas al la *Granda Beginejo*. Vere, ne ekzistas Flandra Urbo sen beginejo. Plie, Leuven havas eĉ grandan kaj malgrandan.

Kiel aparta urbeto ĝi kuŝas ĉirkaŭ la bela Begineja preĝejo. Beginejo speciale allogas pentristojn kaj inspiras verkistojn. Ni mencias ĉi-tie ke pliaj noveletoj de Antoon Thiry ludas en la Lovena Beginejo.

Ciuj periodoj de la arto estas reprezentataj en tiu frankvila kvartalo, kaj la preĝejo enhavas riĉan kolekton da pentraĵoj.

Laŭ la SCHAPENSTRAAT, ST. ANTONIUSPLAATS kaj PARIJSSTRAAT ni denove alvenas en la MEZO DE LA URBO.

Ni supreniras la unuan monteton dekstre kaj estas sur la OUDE MARKT, (Malnova vendejo) la antikva lovena « Forumo », kie ni vidas la malantaŭan fasadon de la malnova *Draphalo* (Lakenhalle). Jam en 1195 nia urbo havis Draphalon. La nuna konstruaĵo oni konstruis en 1370.

Tiam Leuven estis la plej komerca urbo de Brabanto. Ĝi posedis 2500 laborejojn por la drapindustrio. Post la dekadenca periodo de tiu metio la universitato uzis la konstruaĵon. En 1914 ĝi estis bruligata, sed post la milito ĝi leviĝis el la cindro. Nun ni eniras la straton dekstre de tiu konstruaĵo por rigardi la NAAMSCHE POORT.

Ni malsupreniras denove al la GRANDA PLACO, trairas ĝin kaj enpasas la BRUSSELSCHĤ STRAAT.

Ci-tie sin trovas la *malnova hospitalo* kun *preĝejeto*. Rimarku la « *Romanan Pordegon* » laŭ la stratflanko. Ĝi datumas de 1222, kaj estas ĉio restanta de la dua hospitalo de Leuven.

Poste ni alvenas ĉe la *Sta Jakoba Preĝejo*.

Jen unu el la lovenaj mirindaĵoj : « La sonorilo ekster la turo! ».

La preĝejo datumas de la XVa jarcento. Diversfoje kaj diversaj arĥitektoj laboris al ĝi, tiamaniere ke ĝi nun estas miksaĵo de romana, renesanca kaj moderna stilo. La fiorego prezentas kvar pentraĵojn pri la « Mirakla Sakramento », kion oni honoras ĉi-tie.

Nun ni trairas la BRUSSELSCHĤ STRAAT ĝis la fino. Sekvu nun la urban remparon por admiri de la plej alta parto la PANORAMON de nia Deljourbo. De tie-ĉi oni ankaŭ rimarkas sur la monteto la « Wijnpers » (Vinpremilo) de la Sta Gertruda abatejo. Nun estas la provinca ĝardenkulturista lernejo. Tiel ni alvenas ĉe la MEHLENA PORDEGO, kie sin trovas la *abatejo de la Benediktanoj*.

Tio estas konstruata sur la *Cesar- au Keizersberg* (monto de l'imperiestro), kie antaŭe sin trovis la Kastelo de la imperiestro, kon-

struita post la malvenko de la Normanoj en 891. Tiu fortikajo leviĝis sur la plej alta loko de la urbo. Princoj kaj reĝoj tie loĝis, i.a. Eduardo III, reĝo de Anglujo dumvintris tie en 1338, dum la milito kontraŭ Francujo. Pieter Coutereel, la lovena liberec-heroo, enkarcerigis ĉi-tie la ĉefajn nobelulojn en 1360. Ofte Filipo de Sta Polo tie loĝis, ankaŭ Filipo la Bona vizitis ĝin kun sia edzino Isabelo de Portugalujo en 1432. Mario de Burgondio restadis ĉi-tie ĉirkaŭ la jaro 1477.

Ankaŭ Karolo V loĝis tie dum parto de siaj junecaj jaroj.

Finfine Alberto kaj Isabelo vizitis ĝin. Sed ĝi perdis sian signifon depost la invento de la artilerio. Nun restas kelkaj muroj kaj la monaĥaj pastroj, la Benediktanoj de Maredsous, konstruis grandan abatejon. Rimarku la bildegon de Sta Mario, kiu estas alta je 14m, kvankam malsupre en la urba strato ĝi ŝajnas tre ordinara.

Malsuprenirante la Cesarsberg, laŭ le Mechelsche straat, ni iru al la *Preĝejo kaj abatejo de sankta Gertrudo*.

La preĝejo datumas el diversaj jarcentoj, depost la XIVA jarcento. La turo ankaŭ estas unu el la 7 lovenaj mirindaĵoj, « La turo sen najloj ». Ĝi tamen estas unu el la plej belaj en la lando, datumante de 1453. Arĥitekto estas Jan Van Ruysbroeck. Ĝi estas 71 metroj alta kaj prezentas belegan sagon, formatan de kvar dentitaj ŝtonaĵoj, kiu formas la pinton; eleganta ŝtona balustrado kaj 4 turetoj ĉirkaŭas ĝin. Ankaŭ tiu turo entenas belan sornorilaron de 42 sonoriloj.

Pluen laŭ la Mehlena strato ni revenas sur la Granda Placo, kaj finiĝis la promenado.

Pol VAN DER POEL.

## MAJO

Cu estas hazardo ke Maj'  
La flora monato, la bela  
Plej bone ja rimas kun gaj' ?  
Similas ekkrio ĉiela.

Cu estas hazardo ke Vi,  
Rozeto de l' amo, la ruĝa  
Dum maj, kvazaŭ suna radi'  
Penetris en koro rifuĝa ?

Florriĉa printempa monat'  
Per ĝojo de l' birdokantat'  
Eterne rekreu la gajon :

Printempo de l' vivo, la am' ;  
Virino, de l' vivo l'ornam' ;  
Eterne regigu la majon !

L. VAN DER POEL.

## Diversaĵoj

Meze de Aprilo aperis la jarlibro 1937 de la Internacia Esperanto-Ligo. Okaze de la jubileo de Esperanto, ĝi havas plaĉan oran kovrilon. La kompilintoj ŝajne havas pli da praktika sento ol tiuj de la antaŭaj jarlibroj, ĉar malaperis multaj statistikoj kiuj estas anstataŭigitaj per pli utila prozo. Plej interese estas la raporto kiun prezentis S-ro Malmgren dum la kongreso en Vieno. Same, taŭga informo : la listo de la Britaj lernejoj kie Esperanto estas instruata; venontjara la listo estos kompletigata per informoj el aliaj landoj.

La landoj kiuj montras la plej grandan nombron da delegitoj estas Anglujo, Ĉeĥo-Slovakujo, Francujo, Svedujo; Germanujo komplete malaperis el la listo.

En Belgujo estas delegitoj en 30 lokoj; kun miro ni konstatis ke Verviers nombras 100.000 loĝantoj; memkompreneble oni povas rondigi la ciferon, sed la delegito iom troigis rondigante de 50.000 ĝis 100.000 !

Nepravigeble estas ke delegitoj el la flandra landparto skribas franclingve la stratnomojn, eĉ tie kie la urbestroj mem forprenis la francan tekston. Por la esence flandra urbo Brugge, kun ekskluzive flandralingvaj nomoj, estas indikata « rue de l'outre », kiam la efektiva nomo estas « Wijzakstraat », por la urbo Sint-Niklaas, eĉ la urbo-nomo estas nur france skribita; ankaŭ rimarko por Oostende, kvankam la stratnomoj estas dulingvaj (kontraŭleĝe !) ne decas forskrapi la flandran nomon. En la listo de la valonaj urboj, oni vane serĉus tradukon de urb- aŭ stratnomoj. Flandroj ! respektu vian gepatran lingvon kaj estu raskonsciaj !

La raporto pri la situacio de Esperanto en Belgujo tute silentas pri la ekzisto de Flandra Ligo Esperantista kies membronombro tamen superas tiun de la tutlanda asocio. Pli korekta estas la « oficiala » Nederlanda asocio, kiu honeste mencias la ekziston de ĉiuj konkurencaj ligoj. La eminentuloj el la oficiala belga movado plene meritas la nomon : « Petits Belges » ! Ili lernu kaj apliku la devizon sin trovanta sur paĝo 80 de la jarlibro :

Vivu la harmonia internacia Esperanto-kunlaboro !

\* \* \*

LA VARBKONKURSO DE « FLANDRA ESPERANTISTO » estis granda sukceso. La partoprenintoj sukcesis forkapti 27 libro-premiojn i.k. estis kelkaj interesaj kaj valoraj verkoj (Tra la Labirinto de la Gramatiko, Per Balono al la Poluso, Plena Vortaro de Esperanto k.t.p.). La administracio de « Flandra Esperantisto » deziras al ĉiu premiito multan ĝuon !

\* \* \*

KURSGVIDANTOJ atentu ! Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapeŝt VIII. Mária-u 34.

---

*Pro manko de loko kelkaj artikoloj ne povis aperi. Ili aperos en la sekvonta numero.*

« FLANDRA KATOLIKO », en sia lastaperinta numero, publikigas liston menciantan la « Ĉefpekoj-n de flandra katolika Esperantisto ». Unu el la pekoj estas : « Ne koni aŭ ne apliki la internan ideon ». En la sama numero ni trovas komunikon pri la malpermeso, flanke de la Svislanda registaro, de « Proleta Esperanto-Asocio » kaj jenan mallongan sed multsignifan komenton : « Wij juichen toe » (Ni aplaŭdas). Ankaŭ la redakcio de « Flandra Katoliko » ne peku !

\* \* \*

SCIIGO. — Por pli faciligi la laboron de la kongreskomitato, la kongresanoj kiuj ankoraŭ aliĝos estas petataj sendi ĉiujn sciigojn pri loĝado, festeno kaj ekskurso al S-ino De Kesel, Bondgenootenlaan, 177, Leuven. Samtempe ni volas rememorigi la kongresanojn n° 28, 47, 55, 58, 61, neliganojn, ke la kotizo por ili estas Fr. 15.— ili bonvulu pagi la restaĵon kiam ili ricevas siajn kongresdokumentojn.

La Kongreskomitato.

## Grupa Vivo

### AALST. PIONIRO.

Kiel en diversaj lokoj, Flandra Ligo Esperantista, aranĝis Ĉeskurson en Aalst. La provleciono okazis la 15-an de Marto en nia ejo. 40 personoj ĉeestis.

S-ro Rainson parolis pri Esperanto kaj ĝia valoro. Poste li prezentis la gvidonton de la kurso, S-ron Henk Thien.

Post la leciono kiu estis tre interesa kaj agrabla, ĉiuj ĉeestintoj aplaŭdis la profesoron.

Por la 1-a leciono enskribis 9 personoj kaj por la dua ankoraŭ 3, do entute 12 Tio-ĉi vere ne estas sukceso, sed ni tamen estas kontentaj, ĉar ni esperas ke tiamaniere nia grupo reiĝos tiel vigla kiel antaŭe, por ke ni povu dece festi la dekjaran datrevenon de la fondiĝo de nia grupo.

### ANTVERPENO. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Dum la lastaj semajnoj niaj klubkunvenoj pli kaj pli vigliĝas. Ekster la ordinaraĵoj, mi citas kelkajn pli gravajn okazintaĵojn. Unue, la vere interesa parolado de nia prezidanto pri grafolgio. Precipe ĝia t.n. praktika parto pleje amuzigis nin. Vere mirige, la konkludojn, kiujn oni povas fari el la diversaj skribmanieroj de la streko en la litero t. Kaj tio estis nur unu litero ! nur streketo ! Analizante tiamaniere la tutan abc, li povus plenigi ĉiujn klubkunvenojn de la jaro.

La 24-an de Marto nia prezidanto parolis pri siaj spertoj kun korespondantoj, kio vidigis strangajn rezultatojn. Novaj proponoj estis faritaj por nia « Viva Gazeto ». Kurso por komencantoj komenciĝis en nia ejo. Partoprenis ĝin 20 lernantoj. Gvidanto estas nia prezidanto.

La 31-an de Marto, du el niaj membroj, kiuj partoprenis la Nederlandan Kongreson en Den Helder, rakontis pri siaj travivaĵoj kaj spertoj. En vere entuziasmaj vortoj ili skizis la tian aranĝon de la kongreso. La datrevenon de la mortotago de Zamenhof, nia grupo inde rememoris. Okazis paroladoj, deklamadoj, kantoj. En sia enkonduka vorto, nia prezidanto elokvente parolis pri nia Majstro, substrekkis kial li mortis ĝuste dum la milito; koncize li parolis pri la « interna ideo » kiu ŝajne tute mortis en nia « praktika tempo ».

Sekvis bela, arta deklamado de F-ino Verlinden, kiu aŭdigis al ni kelkajn poemojn. Ĉar en la sama tago okazis la « Tago de la Originala Esperanto Literaturo », S-ro Vermuyten detale parolis pri la esperanta literaturo, precipe la antaŭmilita. Li ĝuigis nin per la deklamado de la Zamenhofa poemo « Ho, mia kor ». Per kelkaj vortoj li menciis la postmilitajn literaturajn verkaĵojn, deklamis ankaŭ poemojn de J. Baghy.

Post kantado de La Espero, finiĝis tiu vere sukcesinta kunveno. Ĉeestis ankaŭ kelkaj membroj de alia klubo.

#### BRUSSEL. — N.E.L.E.

Op 25 Maart organiseerde onze afdeling een gezellig samenzijn waarop we het genoeg hadden de leden van afdeling Vilvoorde in ons midden te tellen; ook leerlingen onzer twee kursussen waren opgekomen. Het was een stemmige avond waarop besloten werd begin Mei iets dergelijks te beleggen.

Op onze vergadering van 1 April hield ons bestuurslid Arm. Ackaert, een belangrijke lezing in Esperanto over « La Flandra Literaturo ĝis 1830 ». De leden toonden een warme belangstelling voor het onderwerp en zien verwachtend naar het vervolg uit !

Onze kasistino ontving de jaarlijksche toelage door het Provinciebestuur aan onze afdeling toegekend.

De leden onzer afdeling die nog niet toetraden tot den Vlaamschen Esperanto-landdag te Leuven, worden hierbij voor de laatste maal op hun plicht gewezen, N.E.L.E. moet voltallig aanwezig zijn !

#### DIKSMUIDE. — GRUPO ZAMENHOF.

Kun ĝojo ni povas sciigi al la flandraj gesamideanoj ke en nia urbeto estis fondita esperanta grupo — « Grupo Zamenhof » — ĉiunarde la grupo kunvenas en la Hotel de Francujo, je la oka vespere. Korespondataĵoj oni sendu al la grupa sekretario S-ro Raf. Demoen, instruisto, Maria Doolaeghestraat. Samideanoj, ĉu flandraj ĉu eksterlandaj kiuj deziras viziti nian urbeton, skribu al S-ro Odaer Vandamme, Oficisto, IJzerlaan, aŭ al S-ro Marcel Maekelberg prezidanto de la grupo Zamenhof, IJzerlaan.

Nia finfesto kiu okazis la 20-an de Marto en la festsalono Minerva bonege sukcesis, precipe dank' al la kunlaboro de le grupanoj de Torhout kaj Woumen. La alloga salono estis plenplena je multaj esperantistoj de la loka grupo kaj de la tuta regiono, kiuj laŭte aplaudis la diversajn artistojn. Post la festo okazis balo, ĉiuj bone amuzis sin ĉar la orkestro estis unuaranga, kaj ĉiuj nur kontraŭvole reiris hejmen je la 3-a matene.

Kaj nun denove al la laboro por nia idealo.

### *MECHELEN. — LA ESTONTO.*

Ni faras novan alvokon por, ke ĉiuj niaj membroj regule ĉeestu la semajnajn kunvenojn en la hejmo de la prezidanto, Hombeeksche steenweg, 54. Ne devas esti necesa ĉiam sendi invitilojn pri kunvenoj, kiuj tamen ĉiun semajnon okazas. Nur per sufiĉa kunestado estas ebla bone labori kaj organizi interesajn vesperojn.

### *OUDENAARDE. — AL PACO.*

Jen la programo de la kunvenoj por tiu-ĉi monato.

4-an Majo ni havos kantvesperon.

18-an ni daŭrigos la tradukon de nia urba historio.

Ni tre ĝojas ke la Ĉseh-kurso en nia urbo sukcesis, se ne grand-skale tamen kontentige. Ni havas 30 gepartoprenantojn, kaj inter ili la plej inteligentajn. Ni do esperos ke nia grupo pliriĝigos je dudeko da membroj.

Faru multan propagandon, ĉar nur tiamaniere ni atingos nian proponitan celon por nia kvinjara ekzistado.

### *ROESELARE. — RUSELARA ESPERANTISTA GRUPO (R. E. Ĝ.).*

Okaze de Pasko nia grupo libertempis iomete, sed malgraŭ tio la Esperanta movado ne dormis en nia urbo.

Je la Pasko-tagoj la skoltoj ekzpoziciis siajn ilojn kaj aĵojn en la ejo « Arsenaal ». Kial ne profiti de tiu okazo por propagandi Esperanton.

Ni aranĝis tre allogan kaj interesplenan propagandlokon en la granda salono. La multnombro de vizitantoj pruvas al ni ke la popolamaso sentis favore al nia laboro. Kun ĝojo ni konstatis, ke multaj ne nur vizitis nian ekspozicion sed ankaŭ demandis klarigojn.

Dank' al la taŭga materialo de Flandra Ligo kaj kelkaj bonvolaj personoj, ni kapablis konvinki ilin pri la utileco kaj internacieco de Esperanto. Ni, kiuj staras meze en la movado, scias kion celas Esperanto, sed al la ne-esperantistoj ni devas montri la pruvojn ke ĝi estas lingvo, tiel perfekta ol kia ajn alia naci-lingvo, ke ĝi ne nur servas kelkajn popolojn sed la tutan mondon sen distingo de haŭtkoloro.

### *RONSE. — LA PACA STELO.*

Niaj kantvesperoj bone funkcias kaj menciindaj estas ankaŭ niaj diskutaj vesperoj, bona metodo por interbabiligi nian samideanaron.

Nia Sparkaso bone funkcias kaj dank' al tio ni alproksimiĝas nian dudekon da gepartoprenontoj, al la kongreso.

Kun ĝojo ni jam interkorespondas kun nia prezidanto, el Mechelelen, S-ro Rainson, por okazigi en nia urbo, la Ĉseh-kurson, kaj jam estas promesata ke S-ro Solc, donos la kurson. Ni penados por havi sukceson kaj nenion preterlasos por propagandigi efikmaniere.



La unuan dimanĉon de Aprilo ni havis nian unuan piedan ekskurson kaj ĝi bone sukcesis, dum kiu ni aŭdigis tutan repertorion de nia ampleksa kantaro.

La Paca Stelo, antaŭen marŝas. La estraro ankaŭ pristudas por doni infankurson sub gvido de S-ro De Boes, kiu verŝajne okazos en Julio au Aŭgusto proksima.

### VICHTE.

La nova grupo alprenis definitive la nomon « Frateco ». La kurso de S-ro Solc estas granda sukceso, 32 gelernantoj enskribiĝis; per agrabla instrumaniero, guto post guto, la nova lingvo penetras en la kapojn. S-ino Faveere sin okupas senlace pri preparo de kantbroŝuro; fotografajtoj de la kurso kaj de la vidindaĵoj el Vichte, kaj ankaŭ speciala artikolo, aperos en « De Dag ».

Por helpi la gelernantojn en la studado, la grupo abonis al « Heroldo » kaj planas aĉeton de libroj se la kasisto Kamiel Demeyer volas doni krediton...

Post la kursoj de S-oj Solc kaj De Graan, Ĉseh-instruistoj, okazos komuna finfesto en Kortrijk kiu samtempe estos regiona kunveno.

### WERVIK — WEVELGEM — ZWEVEGEM.

En ĉi tiuj tri lokoj estis malfermataj Ĉseh-kursoj, sub gvidado de S-ano Nico De Graan el Amsterdam. Malgraŭ intensa propagando, la kursoj ne sukcesis kiel esperite, sume sin enskribis 65 personoj. Ni esperas ke la kvalito kompensos la nombron kaj ke S-ro De Graan atingos starigon de novaj kernoj, kiuj preparos la terenon por nova kurserio venontan vintron.

## Angulo de la Sercemuloj

Mi iom pli malfaciligis la krucvorton, precipe por akriĝi la batalon por la jarpremio. Mi esperas tamen ke neniu malkuraĝiĝos pro tio. Vi ne forgesu ke vi nur devas trovi la 8/10ajn de la vortoj, por havi partoprenrajton al la lotumado. Pripensu ke eble neniu trovos ĉiujn vortojn. Por ĉiu problemo ni forlotumos unu premion. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5-a de Junio 1937 rekte al S-ro F. VOLDERS, BREDASTRAAT, 94, ANTWERPEN. La difinoj kun (R) estas radikvortoj.

**PREMIOJ.** Gajnis premion por la problemo 20 kaj 21 :  
Fr-ino Doedens kaj Callewaert.


*Jarbatalon.* V. D. MAST 100, P. POLLET 100, P. CALLEWAERT 97, V. D. POEL 97 p.

*Solvo de problemo 20 :* HOR. 1) incit — princ. 2) suveren. 3) ore — aro — sam. 4) eni — ptn. 5) hamak — barak. 6) ATENO — pruno. 7) ato — tia. 8) eko — dir — sse. 9) diamant. 10) sport — duono.

VERT. : 1) ilo — na — eks. 2) reatak. 3) ĉsehmetodo. 4) iu — lano — ir. 5) tva — ko — dat. 6) ero — lim. 7) pro — op — rad. 8) re — part nu. 9) instruisto. 10) ananas. 11) cim — ko — eho.

*Solvo de problemo 21 :* La derviŝo flustris : « PRENU LĀ KAMELON DE VIA FRATO ».

PROBLEMO 24. KRUCVORTO. (32 poentoj)



- HOR. :** 1) trifoje la sama konsonanto. — mordanto. (R).  
 2) la inkubo de multaj delegitoj. (R).  
 3) juvela ŝtono reliefe skulptita. (R.). — de 1935 la oficiala nomo de « PERZIE » (R).  
 4) rivero en « SIBERIO ». (R.). — ĉeflaboro de gefianĉoj. (R). — tre urĝa. (mall.).  
 5) parto de teatra verko. (R). — anagramo de kur. — granda aro de

domoj kaj konstruaĵoj. (R).

- 6) antologio.  
 7) spiritualismo.  
 8) marherbo. (R). — herbaĉo el familio : gramenacoj. (R).

**VERT. :** 1) ŝtopilo. (R).

- 2) plenumi taskon.  
 3) kie finiĝas iu difinita spaco. — preparita haŭto. (adj.).  
 4) turnigita geometria korpo. (R). — rajdseĝo. (R).  
 5) norda cervo kun larĝaj kornoj. (R). — iam.  
 6) korppeco de rava mamulo. (R).  
 7) granda vazo. (R). — batalilo.  
 8) fortege deziranta ion. (R). — ludkarto.  
 9) planedo. (R). — anagramo de mult.  
 10) alkala blanka metalo.  
 11) nebulo ombro.

PROBLEMO 25. (5 Poentoj).

De A al B estas 150 klm. El A foriris vagonaro kun rapideco de 60 klm en unu horo. Samtempe foriris el B al A vagonaro kun rapideco de 40 klm. Kiam la vagonaro el A forveturis, forflugis ankaŭ el A al B birdo, kun rapideco de 80 klm en unu horo. Kiam tiu birdo renkontas la vagonaron el B, ĝi returnis al la alia vagonaro, kaj kiam ĝi denove renkontis la vagonaron el A ĝi denove returnis al la alia vagonaro. Tiamaniere ĝi daŭrigas flugi de la unu vagonaro al la alia ĝis kiam ĝi estis frakasita inter la bufroj de la du vagonaroj. Kiom da klm. flugis tiun birdon. Imagu ke dum la turnado ĝi ne perdis tempon, kaj do ĉiam flugis je 80 klm en unu horo.

KUDRO-BATALO

Sur la lasta paĝo de la Aprilo numero, aperis artikolo pri kudro-batalo. Ĉar nia revuo aperis iom malfrue ni volas prokrasti la ensenddaton ĝis la sekvonta monato. Vi do nur devas ensendi viajn majstro-verkojn antaŭ la 5-a de Junio. Notu tamen bone ke vi nepre devas uzi kudrilon num. 5 kaj ke la fadenoj devas esti kudrofadenoj.

# FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

## (Vlaamsche Esperantisten - Bond)

**Voorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.  
**Ondervoorzitter:** E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.  
**Sekretaris:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.  
**Penningmeester:** Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.  
**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, 22, Hamme (O. Vl.).  
**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.  
**Lidmaatschap:** 5 fr.; met maandblad: 25 fr.  
**Postchek:** Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50

### AFDEELINGEN:

**Aalst:** « Pioniro ». Sekretariaat: Molenstraat, 30.  
**Aarschot:** « La Progreso ». Sekretariaat: Albertlaan.  
**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esp-ista ». Sekr.: Statiestraat, 156, Berchem.  
**Arendonk:** « La Verda Kampina Stelo ». Sekretariaat: Schotelven, 4.  
**Blankenberge:** « Norda Stelo ». Sekretariaat: Koninginnelaan, 18.  
**Brussel:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3.  
**Diksmuide:** « Grupo Zamenhof ». Sekretariaat: Maria Doolaeghestraat.  
**Kortrijk:** « Esperantista Grupo ». Sekretariaat: Moeskroenstraat, 11.  
**Leuven:** « La Nova Tagiĝo ». Sekretariaat: Tienschestraat, 106.  
**Lichtervelde:** « La Tagiĝo ». Sekretariaat: Wetstraat, 44.  
**Mechelen:** « La Estonto ». Sekretariaat: Vekestraat, 25.  
**Oostende:** « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Peter Benoitstr., 27.  
**Oudenaarde:** « Al Paco ». Sekretariaat: Nederstraat, 8.  
**Roeselare:** « Ruselara Esperantista Grupo ». Hoogledesteenweg, 163-165.  
**Tienen:** « Zamenhofs Standardo ». Sekretariaat: Bruulstraat, Kumplich.  
**Torhout:** « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Boomgaardstraat.  
**Vichte:** « Esperantista Grupo ». Sekretariaat: Harelbekestraat, 29-a.  
**Vilvoorde:** « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Marius Duchéstraat, 45.  
**Woumen:** « Veni, Vidi, Venki » (V.V.V.). Sekretariaat: (Rom. Vandepoole).  
**Zaventem:** « Verda Standardo ». Sekretariaat: Heldenplaats, 115.

### VERTEGENWOORDIGERS:

**Assche (Brab.):** L. De Rop, Tenberg, 24.  
**Astene:** M. Vanderlinden, Dorp, 54.  
**Deerlijk:** Fr. Benoit, Kapellestraat, 7.  
**Gent:** Fino J. Terryn, Raapstraat, 82.  
**Harelbeke:** A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.  
**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.  
**Ronse:** G. De Boes, Wijnstraat, 81.  
**Tielt:** R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.



EEN TAAL LEEREN IS INSPANNING  
ESPERANTO LEEREN IS ONTSPANNING

DE INTERNATIONALE HULPTAAL  
ESPERANTO kan door eenieder  
aangeleerd worden op aangename  
wijze, volgens rechtstreeksche methode,  
met ons geïllustreerd leerboek,  
bevattende 200 afbeeldingen, waar-  
onder een aantal uit de bekende  
Adamson-reeks.

Het boek wordt portvrij toegestuurd  
mits storting van 12 fr. op postreke-  
ning Nr 3268.51 van F.E.I.

OSTENDO

---

## HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

---

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

5-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

---

### DRUKKERIJ

★ Aŭtomata Presejo

## H. BRAEKEVELT

Statedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversaj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.



Proksime de la naĝejo (200 m.).

« Presejo Groote Centrale Drukkerijen », Kipdorpvest, 26, Antwerpen.

## “BREUGHEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel



Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



## Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen



Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj

manĝaĵoj — Bonega servado.



Ejo de Flandrema Grupo.

---

## St MARIABURG

10 KM. DE ANTVERPENO

## Grand Hotel de la Chapelle

---

lokita en arbarĉirkaŭaĵo  
ĉia moderna komforto — aŭtomobilejo  
laŭteniso — infanludejo — teraso

Restoracio — Familia pensiono

N.B. - Elektita loko por ekskursaj celoj  
Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

Wwe VAN HAVER DE BOES